

Doktoro Helmar Frank (1933-2013) forpasis la 15an de decembro 2013.

Dr Frank prezentis plej konkrete, kial **ESPERANTO** havas „***lern-helpan efikon***“.

Ni citas el la retejo www.edukado.net, el la paĝo PANTEONO

(...) Esperanton li ellernis en Paderborn, kie estis “Esperanto-Centro” kun granda librejo de Hermann Behrmann. Frank aprezis lernfacilecon kaj “algoritmecon” de la lingvo, kiun li opiniis taŭga propedeŭtiko por instruado de fremdlingvoj anstataŭ plifruigo de la instruado de la Angla. Konatiĝinte kun István Szerdahelyi, li informiĝis pri Esperantaj propedeŭtikaj eksperimentoj kaj mem organizis 1975-1984 por sescent infanoj “Lingvoorientigan instruadon”, kies pozitivajn rezultojn li mezuris per propraj klerigkibernetikaj metodoj. Propagado de Esperanto kiel unua fremdlingvo en Eŭropo iĝis parto de lingvopolitika laboro de Frank, precipe en “Eŭropa Klubo” (1974-2009), kiun li kunfondis kun la celo kontribui al lingva samrajteco de Eŭropo.(...)